ĜENERALA INFORMILO

N-ro 144 julio 2007

BARCELONA ESPERANTO-CENTRO
Bassegoda, 40, 3º, 1ª
ES-08028 BARCELONA, Hispanio, Eŭropa Unio
Telefono 93 333 80 81, barcelonaesperantocentro@yahoo.es

A T O M O
Junulara Sekcio de B E-C




**FIRENTITATS ' 07**

**Barcelono. Bela evento de la 4a ĝis la 6a de majo okazis en la Parko " l'Espanya Industrial",la populara kaj kultura renkontiĝo plej altira kaj sukcesa de nia mirinda urbo .Pli da 100 sportaj,edukaj kaj amuzaj asocioj montris sian agadon. Sur la foto starigitaj Jesús Muñoz kiu faris tiu ĉi foton, pri la stando de BE-C, dekstre Pako Crespo, sekretario. Kaj siditaj maldestre s-ino María kaj Adela Gomila prezidantino de la grupo "AŬRORO". Centoj da informiloj estis disdonita dum la tri tagoj.**

**ATENTON.......ATENTON.......ATENTON.......ATENTON.......ATENTON**

**Pro la gravega malsano de Josefina Girona edzino de Salvador Aragaj, prezidanto de BEC, la estraro de Barcelona Esperanto-Centro decidis NE okazigi la 6-AJN SOMERAJN DIALOGOJN dum la dato 8-a kaj 9-a de septembro en Monistrol de Montserrat.**

**1977 – 2007 30-a DATREVENO DE BARCELONA ESPERANTO-CENTRO**

Karaj gelegantoj. Vi ricevis regule nian sendaĵon " Ĝenerala Informilo" , En ĝi vi povas konstati , ke BE-C eldonis dum tiu periodo kun la helpo de siaj estraroj 10 E-librojn, ekzemple en la pasinta jaro la verkojn "Esperanto en Katalunio" kaj "Diccionari Català – Esperanto". Ĉiujare kunorganizas la kongreseton: "Internacia Esperanto-Semajno " kaj " Someraj Dialogoj".

**Se vi ankoraŭ ne estas membroj de nia asocio kaj vi deziras subteni kaj helpi nian agadon, bonvolu aliĝi po 30 € jare kaj vi ricevos la jenajn avantaĝojn.**

**1.** 10% da rabato por la aĉetitaj libroj.
**2.** Uzi senpage la ricevitajn revuojn de BE-C: Antaŭen; Boletín (HEF); Esperanto (UEA); Esperanto-Dokumentoj (UEA); Fido kaj Espero; Gazeto Andaluzia; Informilaro: Internaciisto; KAE; La Gazeto; La Informilo; La Kancerkliniko; La Revuo Orienta; Le Monde de l'Esperanto; Libera Trako; Monate ĉe vi; Nia ponto; Saluton! ; Sud-rejna kuriero.
**3.** Partopreni senpage en la Esperanto-Kursoj de la du sidejoj de BE-C kaj en la Internacia Esperanto-Semajno kaj en la Someraj Dialogoj kaj en la festo Firaentitats 2007.
**4.** Individuajn infomojn pri la Internaciaj kaj Naciaj Esperanto-Kongresoj.
**5.** BE-C estas peranto de la menciitaj revuoj en la punkto **2**; tio signifas ke vi povas aboni ilin rekte per BE-C.

Gekaruloj, celebru kun ni la 30-an datrevenon de Barcelona Esperanto-Centro.La estraro atendas vian subtenon kaj kunlaboradon. Koran dankon.

Salvador Aragaj (BE-C Prezidanto)



**ESPERANTO-KURSFINO EN BARCELONA ESPERANTO-CENTRO 27an de JUNIO**

**Estraranoj, membroj, kaj geamikoj tostis vigle kaj ĝoje "Cava Esperanto-n" por festi la efikan kaj interesan instruadon de nia internacia lingvo Esperanto, sed kiel oni diras "Novan Kurson novan vivon" ĉiuj ni deziris kaj deziras,ke la nova lernojaro estos se eblas pli grava ol la antaŭa. Ĝis la 19an de septembro en "Casinet". Bonan libertempon kaj ĝis revido,nome de la BE-C.**

## AL TIUJ KURAĜULOJ DE PALOS

Karaj, rigardu alten en la etero
jen mia varma spirito Esperanta,
plena de estimo kaj granda espero
por ke nia agado estos venkanta.

Ĉar via, nia kongreso estas ero
de homara grupo ĉiam batalanta,
por plena interkompreno en la tero
ĉiam homan pacon kaj amon celanta.

Vidis mian spiriton en la aero
vi jam konstatis, ke ĝi estas ploranta,
ĉar ĉiam de la korpo ĝi estas ero
sed la korpo kongreson ne ĉeestanta.

En la vivo ĉiam estas la vero
la neplenumo de tio deziranta,
tiu poezio estas maniero
resti viadispone ĉiam servanta.

Kompanoj laboru forte, kun tolero
kolegaro de via estas esperanta,
kongresoj modestaj estas piliero
fundamenta de movado triumfantan.

Luis Serrano Pérez
Sabadell 3-7-2007

## Al Zamenhof

" Sonu sonoril' " (Ĵingle bell)
R-S. Güell

Sonu nun, sonu nun,
sonu sonoril';
en la kor' nia kor',
ĝojoj estu mil, hej !
Baldaŭ jam, baldaŭ jam
venos nova aŭror',
kaj en korp', el la kor'
iĝos for langvor'.

Kantu ni tintilajn kantojn
gaje al la estontec',
rememorante kun kune
beleventojn pri infanec',
Zamenhof elpensis lingvon
por interhoma kompren'
kaj pravigis lin homaro
dum jarcenta datreven'!

Sonu nun, sonu nun,
sonu sonoril';
en la kor', nia kor',
ĝojoj estu mil, hej !
Baldaŭ jam, baldaŭ jam
venos nova aŭror',
kaj en korp', el la kor',
iĝos for langvor', Heeej !!!




**50A INTERNACIA FERVOJISTA KONGRESO EN PARIZO, FRANCIO**

Organizita tre bone de la Franca Fervojista Esperanto-Asocio la kongreso en Parizo estis por ĉiuj partoprenantoj, neforgesablaj spertoj. Bela kongres-urbo, interesa programo, amuza etoso, resume ĉiuj estas kontentaj. Bonvolu rigadi la foton.

**CREADOS Y PARIDOS......**

Dicen, que del Bing Bang
vengo,
dicen, que del Edén Bíblico
vengo,
dicen, que del mar y de la tierra
vengo,
solo sé, que de un parto
vengo......
¿Quién tiene la llave,
de la vida, muerte y nacimiento,
si, pensamientos, secretos y misterios,
siglos y siglos siguen cabalgando,
en el espacio y el tiempo...?

**C R E C E R.......**

Semilla fuí,
en plena obscuridad claustral,
sin tierra ni abobo crecí,
arrancado y expul,sado
en la madurez y libertad .....

**Barcelona julio 2007 Jesús Muñoz**

---

**15a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO**

**TOSSA DE MAR, HISPANIO, EŬROPA UNIO,29 SEPTEMBRO 6 OKTOBRO**

**" Sub aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo "**

**Lastaj sciigoj: La organiza komisiono informas vin, ke jam aliĝis la kongresano n-ro 100**

---

# L'esperanto, patrimoni de la Humanitat

## 30 anys del Barcelona Esperanto Centro, que ofereix classes gratuïtes d'aquest idioma universal cada dimecres, de 19 a 20.30 hores, al Casinet d'Hostafrancs

Barcelona Esperanto Centro es va fundar el 1977, així doncs, aquest any, celebren el 30è aniversari. La festa serà durant la 15ena. Setmana Internacional Esperantista de la Cultura i Turisme a Tossa de Mar, del 29 de setembre al 6 d'octubre.
Un aperitiu ja es va viure als cursos intensius dels passats 4, 5 i 6 de maig del Firentitats.
Uns dels objectius del Barcelona Esperanto Centro és l'ensenyament de l'idioma internacional esperanto i la publicació de llibres, els dos últims dels quals són: *Esperanto en Katalunio* i *Diccionari català-esperanto*.
Cada dimecres, de 19 a 20.30 hores, fan un curs elemental i un superior al Casinet d'Hostafrancs (Rector Triadó, 53), completament gratuïts.
En el curs elemental s'ensenya la pronúncia de l'alfabet, les 16 regles fonamentals, prefixos, sufixos, preposicions, i a utilitzar els verbs simples. També s'estudia la història de la llengua internacional: Zamenhof va crear la primera gramàtica i vocabulari d'esperanto a Varsòvia, el 1887.
En el curs superior, la clase es fa totalmente en esperanto. És una conversa entre alumnes i professor. Es treballa la sintaxi i l'estil. Regularmente visiten les classes esperantistes els estrangers, facilitant així una pronunciació internacional.
El nombre d'alumnes és d'un mínim de cinc persones i un màxim de 10 persones. Cada curs té una durada de 40 hores. El nombre de socis de l'entitat, actualment, és de 40 persones.
L'eslògan del Barcelona Esperanto Centro és: "L'esperanto, patrimoni de la Humanitat".■
*Redacció*




Foto de família de la classe d'esperanto de l'any passat, al Casinet d'Hostafrancs.



